nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2024

## LABOROJ EN LA SIDEJO

Meze de marto komenciĝos riparoj en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio en Madrido, kiun kunhavas la Madrida E-Liceo. Oni farbos la murojn, oni anstataŭos fenestrojn kaj pordon, kaj kelkajn aliajn malgrandajn laborojn. Tial, povas okazi ke iuj el la kutimaj aktivadoj povas esti malhelpataj.

Laŭ decido de la ĝenerala kunveno de MEL, kiu okazis en la sidejo la 19an de februaro, la Liceo prenos sur sin la kosto de la ŝanĝo de la enirpordo.

Aliaj decidoj de la kunveno estis la nealtigo de la kotizo de la asocio, kiu restas ankoraŭfoje je 12 eŭroj jare. Vi povas pagi ĝin, se vi ankoraŭ ne faris aŭ ne aliĝis al la asocio, pere de la banka konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

## PRELEGO EN LA SIDEJO

La unuan lundon de marto, la 4an, estas programita prelego en la sidejo (strato Rodríguez San Pedro, 13, 3-a etaĝo). La temo estos "Geniaj filoj de esperantistoj: novaj pruvoj", fare de Toño del Barrio. La prelego komenciĝos je 19,00 horo, kaj la ĉeesto estas libera.

La ĝenerala kunveno decidis ke oni plu organizos aktivaĵojn en la sidejo, la lundojn. Bv. anonci vin se vi havas ideojn aŭ iniciatojn pri tiaj agadoj.

## PARTOPRENO EN FEBRUARA RENKONTO

Du madridanoj (Albert kaj David) partoprenis la RenKEJtiĝon, renkonton organizitan de Kataluna Esperanto-Junularo, de la 23a ĝis la 25a de februaro 2024 en L'Espluga de Francolí, kun riĉa kaj amuza programo.



**nia voĉo** **marto 2024**

## EKSKURSETO EN MADRIDO EN FEBRUARO

La dimanĉon 11an de februaro kelkaj amikoj vizitis la madridan straton Doctor Zamenhof, por rigardi la staton de la strato kaj memori la fondinton de la lingvo, antaŭ ol viziti la faman parketon Quinta de los Molinos, kun ties plenfloraj migdalarboj.






## ANONCO PRI LA TAGO DE LA LIBROJ

En aprilo ni havos ŝancon organizi novan aktivadon en la sidejo: MEL estis denove invitita partopreni la Nokton de la Libroj, kiun organizas la Madrida Registaro, la 19an de tiu monato. La temo de la Tago estos ĉijare "la hejmo/domo por ĉiam".

Ni informos pri la fina organizado, sed dume bonvenas (sin)proponoj.

## RENKONTOJ EN MADRIDO

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed atentu la antaŭan informon pri la laboroj kiuj povos malhelpi iujn renkontojn. Bv informiĝi antaŭe.

Ankaŭ plu daŭras la kurso de Esperanto en la sidejo, la sabatojn, inter la 11a kaj 13a horo.

La unuasabata kunveno okazos ĉimonate la 2an de marto, je la 18:30, denove ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrohaltejo Alsacia). Bv memori ke ĝi estas malferma al ĉiuj interesatoj, sendepende de via lingvonivelo aŭ antaŭaj kontaktoj kun la lingvo.




## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com